

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 4, n-ro 5 (23): januaro-februaro 2012
Antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ekde la 13-a.
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

La malnova jaro finiĝis, nova jaro komenciĝis. Al ĉiuj niaj gelegantoj ni deziras feliĉan kaj prosperan jaron, bonan sanon kaj frukto-donan agadon por Esperanto. En tiu ĉi jaro nia lingvo festas sian 125-jariĝon. Gratulon al ĉiuj esperantistoj ie ajn en la mondo!

Kvankam sur nia malnova kontinento la Esperanta movado ŝajnas troviĝi en krizo, kiu estas ne nur financa kaj ekonomia, sed ankaŭ kultura kaj morala, nia lingvo tamen progresas en la aliaj kontinentoj. Iom post iom la azia kontinento ŝajnas transpreni la gvidan rolon de la Okcidento. La historia de la mondo pruvas, ke ĉiuj gravaj regnoj havis sian periodojn de kresko, de florado kaj de velko, tute kiel la floroj. Ankaŭ la Okcidento ne eskapas al tiu leĝo. Ni, esperantistoj, do ne malesperu, sed daŭrigu nian agadon por nia lingvo kaj pli justa mondo.


Agrablan legadon al ĉiuj!

Pieter Jan Doumen

Dua Libro de l' Lingvo Internacia (4) (*Tweede Boek van de Internationale Taal (4)*)

Kelkaj [personoj] provis montri al mi, ke mia projekto de l' voĉdonado estas 'matematike' neebla; tiel ekzemple unu faris jenan kalkulon: "Se ni prenos, ke la enskribado de ĉiu promesanto okupos ne pli multe ol unu minuton, kaj ke vi, forĵetinte ĉian alian laboron, vin okupos sole je tiu afero, laborante sen ripozo 15 horojn ĉiutage, tiam la pretigo de la libro de l' voĉoj okupos 30 jarojn, kaj por eldoni ĝin vi bezonos la riĉecon de Krezo!"

La kalkulo ŝajne estas tute prava kaj povas timigi ĉiun, tamen se la skribinto de tiu ĉi kalkulo bone pensus pri ĝi, li tre facile ekvidus, ke tie ĉi estas sofismo, kaj se nur efektive estos alsenditaj dek milionoj da promesoj, la libron de l' voĉdonado oni povos pretigi kaj eldoni en



kelkaj monatoj kaj sen iaj riĉecoj de Krezo. Ĉar kiu diras, ke la tuta libro devas esti propramane skribita de unu persono? Ke ĉe ĉiu pli granda afero estas uzata 'divido de laboro', la skribinto tute forgesis! Tiaj 'timigaj' libroj estas eldonataj ĉiutage en granda nombro, kaj tio ne sole ne estas neebla, sed neniu eĉ en tio vidas ion grandegan, mirindan.

Se vi kolektos la numerojn de ia ĉiutaga gazeto por unu jaro, vi ricevos libron, kiu laŭ grandeco kaj kosto egalas la elirontan libron de

Miĥaelo Bronstein
la ĥonata rusa trubaduro, poeto kaj aŭtoro
prelegos pri sia restado en gulago
kaj ĥantos proprajn ĥantojn
ĵaŭdon, la 12.01.2012 je la 20h00
en la Malgranda Solono de la Poorthuis,
Zuidervest 2, Peer.
Lia prelego, ĥiun li faros en Esperanto,
estos tradukita en la nederlandan.
Eniro senpaga.

l' voĉoj, kaj laŭ la malfacileco de l' pretigo multe superas mian libron, de kiu la pretigo estas laboro pure meĥanika. Tiel ĉiujare en la mondo estas eldonataj miloj kaj dekmiloj da tiaj 'neeblaj' libroj, kaj tamen neniu el la redaktoroj estas mirindajisto. Sinjoroj la kalkulantoj forgesis tiun simplan, leĝon, kiun ili povas fidi sur ĉiu paŝo, ke tio kio ĉe 'unu' homo postulas 30 jarojn, ĉe cent homoj okupos sole 4 monatojn, kaj kio estas neebila or unu persono, estas ludilo por grupo da personoj.



Naskiĝdomo de D-ro L.L. Zamenhof en Bjalistoko

Al ĉiuj amikoj de l' lingvo internacia mi ripetas ankoraŭ mian peton: ne forgesu la promesojn kaj kolektu ilin, kie kaj kiom vi povas. Multaj pensas, ke ili ne devas sendi promeson, ĉar la aŭtoro mem scias, ke ili ellernos aŭ jam ellernis la lingvon! Sed la promeso estas necesa ne por mi, sed por la statistiko; se iu eĉ skribis al mi kelkajn leterojn en la lingvo internacia, mi ne povas lin nomi internaciisto, ĝis li sendis al mi sian promeson. Ne diru, ke de unu aŭ kelkaj promesoj la grandega nombro ne pleniĝos: ĉiu maro estas kreita de apartaj gutoj, kaj la plej granda nombro devas kaj povas esti ricevita el apartaj unuoj. Memoru, ke, se eĉ la esperata nombro ne estas ricevita, vi nenion perdas, sendante la promeson.

Aldono al la Dua Libro

En mia unua libro me petis ĉiujn amikojn de l' lingvo internacia pri ilia juĝo pri la lingvo, kiun mi proponis, montri al mi ĉiujn erarojn, kiujn ili trovis en ĝi, kaj ĉiujn plibonigojn,

kiujn ili povas proponi, kaj helpi min tiel doni al la lingvo la plej bonan formon, ĉar la finan formon mi intencas doni al la Lingvo Internacia ne pli frue ol en la fino de l' jaro 1888, pripensante kaj provinte antaŭe ĉiujn juĝojn kaj proponojn, kiuj estas senditaj al mi ĝis tiu tempo. En la Dua Libro mi diris, ke, por fari la lingvon libera de ĉiuj personaj eraroj, estus dezirate, ke ia instruita societo prenu en siajn manojn la sorton de l' lingvo kaj, aŭskultinte la konsilojn de kompetentaj personoj, ĝi donu al la lingvo la finan formon, kiu estus egale ordona por mi, kiel por ĉiu alia amiko de l' lingvo internacia.

Nun mi kun la plej granda ĝojo povas sciigi ĉiujn amikojn de l' lingvo internacia, ke mia deziro ne restis vana. Ankoraŭ en la fino de l' jaro 1887, t.e. ankoraŭ antaŭ la ricevo de mia libreto, la Amerika Filozofia Societo en Filadelfio (The American Philosophical Society) elektis komitaton por pripensi kaj decidi pri la demando, ĉu lingvo internacia estas necesa, ĉu ĝi estas kreebla, kaj kia ĝi devas esti. La frukto de l' laboroj de la komitato estas jena decido, 'ke lingvo internacia estas kreebla, ke ĝi estas necesa, ke ĝi devas havi gramatikon la plej simplan kaj naturan, kun la plej simpla ortografio kaj fonologio, kaj la vortoj devas esti agrablaj por la orelo; ke la vortaro devas esti kreita el vortoj pli malpli rekoneblaj por la plej gravaj civilizitaj popoloj; ke la formo de tia lingvo devas esti la frukto de l' laboroj ne de unu persono, sed de la tuta instruita mondo.'

Sur la fondo de ĉio supre dirita, la 'Amerika Filozofia Societo' decidis dissendi al ĉiuj instruitaj societoj la proponojn fari internacian kongreson de instruituloj por decidi pri la fina formo de lingvo tutmonda. Tiel la leganto, ne sciante ankoraŭ pri mia laboro, povas konstati, ke la 'Amerika Filozofia Societo' venis al tiuj samaj decidoj pri lingvo tutmonda, al kiuj mi venis, kaj ke la principoj, kiujn la 'Amer. Fil. Societo' ellaboris por mia lingvo teorie, estas pli-malpli egalaj al tiuj, kiujn mi efektivigis praktike. Tial estas tute nature, ke, ricevinte mian libreton jam en la fino de siaj laboroj, la komitato trovis, ke mia lingvo estas sufiĉe proksima al la idealo, kiun ĝi ellaboris teorie. Jen kion diras pri la Lingvo Internacia sinjoro Henry Phillips jr. (unu el la tri personoj, el kiuj estis farita la komitato por decidi pri la demando pri lingvo tutmonda): "La plej nova propono al la publiko kaj ĝis nun la plej simpla kaj la plej racionala, estas la Lingvo Internacia, kreita de d-ro S* el Varsovio. La principoj, sur

kiuj ĝi estas fondita, estas en la tuto seneraraj – ĝia vortaro ne estas kreita laŭ la persona volo kaj juĝo de l' aŭtoro, sed prenita el la lingvoj franca, germana kaj angla kaj parte el la latina, kaj ĝi enhavas la vortojn, kiuj estas similaj en tiuj lingvoj, sed tamen estas faritaj kelkaj ŝanĝoj pro la bonsoneco. Pro tio kaj pro ĝia gramatiko la lingvo estas mirinde facila por lerni, prezentante neniajn el la kalejdoskopaj rompaĵoj kaj ŝiraĵoj de la Volapuk'. La gramatiko de tiu lin-gvo, kaj la reguloj por la kreado de vortoj estas tiel klaraj kaj tiel facilaj, ke la vortaro de radik-vortoj povas esti farita tre malgranda..."

Rakontinte mallonge la tutan konstruon de l' Lingvo Internacia kaj ĝian gramatikon, kaj montrinte kelkajn punktojn, kiuj laŭ lia juĝo devus esti ŝanĝitaj, sinjoro H. Ph. finas:

"D-ro S*, kiu skribis sub la nomo de d-ro Esperanto, estas tre modesta en siaj postuloj kaj proponas sian lingvon al la publika kritiko tra la tempo de unu jaro, antaŭ ol li donos al ĝi la finan formon. Post tiu fina trarigardo kaj ŝanĝo li volas prezenti ĝin por la publika uzado. Li petas siajn legantojn promesi lerni la lingvon nur tiam, se 10,000,000 da personoj estos donintaj tiun saman promeson. Mi esperas, ke la fina trarigardo de l' Lingvo Internacia kondukos al la bonigo de l' eraroj, kiujn mi montris, kaj ke la tuta mondo povas kuraĝe doni la petitan promeson".

D-ro L.L. Zamenhof (daŭrigota)


La okcidenta krizo vidata de hindo *(De Westerse crisis gezien door een Indiër)*

La hinda sciencisto, R. Vaidyanathan, profesoro pri Financaj Studoj en la Indian Institute of Management en Bangalore, klarigas en tiu ĉi artikolo la hodiaŭan krizon en la Okcidento.

Nur ekde 200 jaroj la Okcidento dominas la mondon. En sia pionira studo por OESO Angus Maddison substrekas, ke Hindio kaj Ĉinio havis en 1820 preskaŭ 50% de la tutmonda Malneta Enlanda Produkto. Hindio kaj Ĉinio ne estas naskiĝantaj potencoj. Ili estas simple reokupantaj sian originan lokon.

En 1990 la parto de la G7 (Usono, Germanio, Britio, Francio, Italio, Kanado kaj Japanio) sumiĝis je 50% de la tutmonda M.E.P., kaj tiu de la evoluantaj landoj 36%. Sed en 2011 oni konstatas la inverson. La dominado far la Okcidento estas nur mito.

Tial la krizo koncernas Usonon kaj Eŭropon, sed ne la mondon. Oni volas kredigi al Hindio,



ke ĝi troviĝas en krizo, sed ne estas krizo ĉe ni. Nenie en la eksterlando dum la lastaj 20 jaroj niaj investoj sumiĝis je pli ol 10% de la enlandaj. Nia kresko baziĝas sur nia enlando ŝparmono, ĉefe la ŝparmono de niaj hindaj mastrumantinoj. Gratulon pro nia kresko meritas niaj patrinoj kaj ne ia okcidenta fondusa administranto.


La krizo en la Okcidento estas imputenda unualoke al la fakto, ke la Okcidento forgesis la nocion 'ŝpari'. Kaj tio estas la sekvo de tio, ke la Okcidento forgesis la signifon de la nocio 'familio'. En la daŭro de la pasintaj 60 jaroj la Okcidento 'ŝtatigis' la familiojn. Pri grandaĝeco, malsano, patrineco – pri ĉio respondecas de la ŝtato.

Kiam la familio kaj la infanoj fariĝas 'ŝarĝo', la socio pereas. La familioj en Usono jam de longe ne plu ŝparas, sed enŝuldigas sin. En multaj landoj, i.a. Britio, la ŝtatŝuldo sumiĝas je 400% de la M.E.P.

Krom tio la Okcidento trairas gravan demografian krizon. Dum la Unua Mondmilito preskaŭ 25% de la monda loĝantaro loĝis en Eŭropo. Hodiaŭ tio estas 11%, kaj post 20 jaroj tio estos nur 3%. Eŭropo malaperos, se enmigraĵoj el Afriko kaj Azio ne transprenos ĝin.

La demografia krizo havas gravajn sekvojn. La socia sekureco disfalos, ĉar la homoj vivas pli longe, kaj nur malmultaj el la subaj tavoloj de la loĝantaro kontribuas al iliaj pensioj per impostoj. Tiel la ŝtatigo de la familioj fariĝas muelŝtono ĉirkaŭ la kolo de la ŝtato.

La labor-etiko en Eŭropo malboniĝis. En Francio kaj Italio la semajnfino jam komenciĝas la matenon de vendredo. La loĝantaro maldiligentiĝis kaj dependiĝis de la ŝtato.



En Britio alkoholismo estas granda problemo. La gepatroj perdis la tutan kontrolon super siaj infanoj. La okcidentano preferas la hodiaŭan ĝuadon al la morgaŭa vivebleco.

En Usono la geedziĝintaj paroj konsistigas nur 45% de ĉiuj familioj. La nombro de la negeedziĝintaj paroj kaj unugepatraj familioj rapide kreskas. Divorco estas vera plago, ankaŭ ĉar ĉiuj divorcintoj devas loĝi kaj vivi. La okcidenta socio malbone funkcias kaj estas neordigita, dum la ŝtato provas resti ordema, sed devas preni sur sin ĉiam pli da taskoj.

Laŭ freŝdata raporto en *The Wallstreet Journal* (de la 10.10.2011) preskaŭ la duono de la usonaj familioj ricevas ŝtatan subtenon, kiel nutrajkuponojn, subvenciitajn loĝejojn, monon, sanprizorgadon, socian sekurecon. La duono de ĉiuj familioj spekuladas per mono, kaj estis grave trafitaj per la bankrotaj de bankoj kaj entreprenoj.

En Hindio malpli ol 5% de la ŝparmono de la familioj estas investita en la borso. La samo validas por Ĉinio kaj Japanio. En Hindio la socio estas ordigita, sed la ŝtato malordigita. Ĉar la okcidenta socio estas malordigita, la ŝtato devas prizorgi la familiojn. Pro la disfalo de la merkatoj esence ŝuldas la okcidenta konsummodelo, kiu daŭre depruntas monon kaj ne ŝparas. Kiel longe la azia ŝparmono kapablos vivteni la troigitan elspezomodelon de la Okcidento?

Tamen la Okcidento volas trudi al ni siajn fiaskintajn modelojn, kaj ni ne reagas, ĉar koloniaj genoj ankoraŭ forte ĉeestas en ni. Por la Okcidento Hindio estas granda, potenciala merkato, kiu povas esti konkerita. Intertempe ni, stultuloj, provos imiti la Okcidenton, kreante malbone funkciantajn familiojn.

(El "Peper en Zout", trad. J.P.D.)

Novaĵoj el Esperantio

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Kamerunio – *Agado de la Afrika Komisiono* –

Nome de la Afrika Komisiono de UEA (AK) mi skribas tiun ĉi mesaĝon por atentigi vin pri niaj agadoj kaj pri la neceso, ke vi plu subtenu niajn laborojn per donacoj.

Ekde februaro 2011 la agadoj de AK evoluas en kontentiga maniero. Ni ankaŭ per financa helpo de ILEI sukcesis aranĝi seminarion en Kinŝaso, Kongo, kaj en Rumonge, Burundio, por estontaj instruistoj de Esperanto. Ni dissendis instruilojn al unuopaj esperantistoj, grupoj kaj asocioj en Benino, Sudafriko, Ugando ktp. Ni mem produktis informilojn, kiuj estis disdonitaj dum la Kopenhaga UK.

Kiel unu el la gvidaj ideoj de nia Komisiono, ni prientendas landajn asociojn kaj grupojn, liverante al ili niajn simplajn lernilojn kaj informilojn. Krom perkorespondaj kursoj, okazas ordinaraj kursoj en Burundio, Togolando kaj Sudafriko sub gvido de komisionanoj kaj en multegaj aliaj afrikaj landoj kun lokaj gvidantoj. Ni atentigas pri la bezono provizi ĉiun landan asocion per informiloj, kaj ni eĉ pretas helpi en la kompostada laboro. La Afrika Komisiono pere de la Afrika Oficejo kreis kaj plu kreas retpaĝarojn por landaj asocioj kaj grupoj, se ili liveras la datumojn. Edukado ĉiam estas granda zorgo de la AK-anoj, kaj ni konsilas la afrikanojn uzi la retajn esperantokursojn en nia paĝaro http://www.esperanto-afriko.org/**. Mallonge, ni provas en ĉiuj kampoj teni viglajn landajn asociojn, kaj grupojn en Afriko.

Ĉar ni opinias, ke virinoj en la afrika movado devus esti pli atentataj, ni ankaŭ subtenas seminarion de virinoj en la Demokrata Respubliko Kongolando venontjare. Sed la realigado de niaj planoj kostas monon. Tial ni alvokas al vi ĉiuj, ĉefe al la neafrikanoj, por ke vi sendu librojn al Afriko.

Adjé Adjévi

Togolando – *Agado de la junulara organizo* –

La togolanda junularo JOTE aktivas multe por la evoluo de Esperanto en sia lando. Ĝi precipe informas tiujn, kiuj scias nenion pri la ekzisto de Esperanto. Post multaj aranĝoj oni finfine sukcesis partopreni televidan elsendon, kiu okazis la 2-an de septembro 2011 en la nacia Televido Togolanda (TVT). La elsendo estis realigita nome de JOTE de ĝia prezidanto Gbeglo Dzifa kaj de ĝia vicprezidanto Ayena Tete. Unue ili prezentis Esperanton al ĉiuj televidspektantoj kaj al la publiko kiu troviĝis en



la televidhalo. Ili respondis al multaj demandoj de la ĵurnalistoj, kiu ĉeestis la elsendon, kiel: “En kiu lando oni parolas Esperanton? Kie oni povas lerni Esperanton? Kiun profiton oni havas lernante Esperanton?” Gbeglo Dzifa kaj Ayena Tete sukcese respondis ĉiujn demandojn. Per esperanta dialogo ili montris al la publiko, kiel sonas la lingvo, kaj poste ripetis ĝin france. Ili ankaŭ lernigis al la publiko, kiel oni salutas en Esperanto. Finfine ili komunikis al la spektantoj la adreson de la Afrika Centro Esperantista kaj la retejon <http://fr.lernu.net>. La publiko bone reagis kaj montris intereson pri la lingvo. Post la elsendo spektantoj kontaktis la estraron de JOTE por ekscii pli pri Esperanto. Pro la sukceso de tiu elsendo la estraro de JOTE estas jam aranĝanta alian.

Gbeglo Dzifa

Kongo – S-rino Esperanto ĉe konga televido –

Sinjorino Esperanto estis invitita de la kongaj ĵurnalistoj de *B-one Television* en la elsendo “*On est ensemble*” (oni estas kune) de vendredo la 28-a de oktobro 2011 je la 18-a horo por respondi al kelkaj demandoj.

Temas pri la prezidantino de la Konga Esperanta Virina Asocio (KEVA), Nelly Masemi. La demandoj unualoke rilatis al Esperanto: “Ĉu ĝi estas mistika scienco? Kial ĝi estis kreita, ĉar jam ekzistas multaj lin-gvoj? Kial vi persone lernis Esperanton? Kio estas KEVA? Kion diras KEVA, kies devizo estas alvoko al mondpaco, pri la balotado en nia lando?”

Ŝi klare respondis al ĉiuj demandoj, invitis la homojn al paca kunvivado kaj alvokis ĵurnalistojn kaj kongajn junulojn lerni Esperanton kiel tre utilan komunikilon por la estonteco de la homaro.

Vanessa Kapenga

Kubo – Esperanta muzika KD de Amindaj –

Fine de oktobro aperis nova esperanta muzika KD de la studenta muzikgrupo Amindaj el Kubo. Ĉi tiu albumo de la muzikgrupo Amindaj, fondita en aŭgusto 2009 de Graciela Morgado Rodriguez, prezidanto de la Urba Klubo de Esperanto en Contramaestre, estas ankaŭ la unua Esperanto KD veninta el Kubo.

La grupo konsistas el junaj amatoroj kaj artinstruistoj engaĝitaj en la Esperanto-movado, kiu jam prezentiĝis sur diversaj scenejoj en Kubo, aparte dum la 95-a UK kaj la 66-a IJK en julio 2010 en Havano.

La ok titoloj de ĉi tiu albumo, ĉiuj kompreneble en Esperanto, estis elektitaj inter dudeko, plej ofte komponitaj de Julián Hernandez Angulo en la varma kuba tradicio, kun violono, gitaro, kontrabaso, marakoj, kubaj skrapiloj, guajo kaj guiro, kongaj, bongo, sonorilo ktp.

Estas tamen inter ili kelkaj malnovaj kantoj, tradukitaj kaj adaptitaj de Maritza Gutiérrez, kiel la internacie konataj ‘Chan Chan’ de Francisco Repillado (Company Segundo), la ‘Son de Loma’ de Miguel Matamoros, kaj eĉ versio – laŭ la kuba maniero – de ‘La Bambo’.

Amindaj en KD aŭ en koncerto kun dancistinoj estas ne nur muzika grupo, sed ankaŭ kultura projekto vere malkovrinda. Eblas aŭskulti fragmentojn kaj elŝuti muzikaĵojn oni povas ĉe http://www.vinilkosmo-mp3.com/amindaj-c-76_191.html?la,giage=eo. La diskon eldonis Vinilkosmo. (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)

Tajvano – Esperanto tamen progresas –

La koro de Esperanto en Tajvano nun forte batas en Pingtung, urbo de ĉ. 220.000 loĝantoj, kiu situas sude de la insulo. Estas nun tie 55 lernantoj, 5 kursoj kaj 2 instruistoj. Duhora ĉiusemajna kurso jam multe incitis la lernantojn, tiel ke ili nun korespondas kun alilandanoj. Filmeto pri la ceremonio, kiu okazis fine de lasta semestro, videblas sur Youtube.

La mezaltlernejo Pingrong estas unu el la plej grandaj en la sudo de Tajvano (ĉ. 3000 studentoj). Jam por la oka sinsekva jaro okazas tie Esperanto-kurso kadre de la eksterkurso lecionaro kun 27 lernantoj. Kvankam la kutima nombro por malfermi la kurson estas 40, pro subteno de la lerneja sekretario la kurso estas malfermita ĉiujare kun kiom ajn da studentoj. Ĉi-jare ni uzas la lernolibron *Esperanto per la Rekta Metodo* de Stano Marček, kaj krome ni lernas per [Lernu paĝaro](http://lernu.paĝaro), kaj jam komenciĝis kontakto kun alilandanoj per ĝi kaj ankaŭ per papera korespondado.

Reza Kheirkhah

Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5
B-3940 Hechtel
Tel. 011-73.02.20
Fax 011-73.02.21
hechtel@kbc.be

Nia bunta, vasta mondo

(Onze bonte, wijde wereld)

1. William Thomas Stead, ĵurnalisto

Prepariĝas celebrado de la centa datreveno de la sinko de Titanic, kiu okazis dum la nokto de la 14-a ĝis la 15-a de aprilo 1912. William Thomas Stead pereis en tiu katastrofo. Li estas la plej fame konata pasaĝero. Li estis survoje al Novjorko por partopreni en packongreso en la Carnegie Hall, kie li estis parolonta pri paco kaj internacia arbitracio.

Brita ĵurnalisto, parolanto kaj subtenanto de Esperanto, William T. Stead (1849-1912) pioniris sur la tereno de esplorĵurnalismo. Konsiderata kiel “la patro de la tabloido¹” – sen rilato kun la nuna klaĉĵurnalismo – , li havis altan ideon pri sia profesio. “*La bona ĵurnalismo, el la vidpunkto de Stead, devis esti uzata nome de la malriĉuloj, de la flankenlasitoj kaj la subprematoj. Esplorĵurnalismo regresis dum jaroj. Eble ĝi bezonas ian reenkariniĝintan Stead*”. (El: W.T. Stead, *the Father of Tabloid Journalism* – Leek, 1899).

Tre influa, Stead aktivis por mondpaco, internacia kunlaboro, bonaj rilatoj inter Britio kaj Rusio, sociaj reformoj (8-hora laboro por karboministoj), konvenaj loĝejoj por laboristoj, protektado de la infanoj, la virinaj rajtoj. Stead fieris pri tio, ke li estis la unua eldonisto, kiu dungis virinojn kun salajro egala al tiu de la viroj. Li interesiĝis pri manieroj redukti malriĉecon en Britio. En 1885 li jam subtenis la ideon pri kreo de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo.

En sia verko *The Americanization of the World (La Usonigo de la Mondo)* Stead kritikis la militon kontraŭ Filipinoj sub la tiama prezidento McKinley, kiu estis rekte agresiva milito,

¹ Gazeto kun multaj fotoj kaj mallongaj tekstoj.

kaj kies celo klare estas krei novajn merkatojn por la usonaj produktoj. (*Henri Masson*)

2. Edwin Hubble kaj la steloj

(Edwin Hubble en de sterren)

En 1929 la usona astronomo Edwin Powell Hubble, kiu precipe pristudis la ekstergalakticiajn stelarojn, proponis leĝon kiu, laŭ li, ebligis kalkuli la distancon de la foraj steloj kaj ilian aĝon. Tiu distanco dependas de la rapideco de la lumo – 300.000 km en sekundo – , sed ankaŭ de la tempo kiun la lumo bezonas por atingi nin. Kaj tie kuŝas la problemo.

Hubble konstatis, ke la lumspekto de iuj galaksioj delokiĝas al ruĝo. Kutime tio indikas, ke la observata objekto foriĝas de la observado (efekto Doppler). La lum-ondoj de la foriĝanta objekto suferas malkunpremon aŭ energiperdon. La malo ankaŭ estas vera: prokimiĝanta objekto kaŭzas kunpremon de la ondoj, tiel ke la spektro ŝoviĝas al bluo. Tial Hubble konkludis, ke la galaksioj foriĝas de ni, kaj tio ankoraŭ pli rapide, laŭ tio ke ili troviĝas pli for de ni. Hubble sugestis, ke la rilato inter distanco kaj rapideco de la observata astro estas konstanta. $H = R / D$. Tiu rilato, kiu estas hipotezo,



La giganta spegulteleskopo de la observatorio de Mount Palomar en Kalifornio (Usono)

ebligis nin kalkuli la hipotezajn distancon kaj aĝon de astro, kondiĉe ke ni precize konas la konstanton H (Hubble) kaj la rapideco de la astro (R). Alia grava, sed nekontrolebla cirkonstanco estas la ekspansirapideco de la universo (H). Hubble pensis, ke ĝi estis relative konstanta en la pasinteco. Li mem donis al H la valoron de 70 ĝis 500 jaroj. Sed el tio rezultis, ke la universo havas nur 2 miliardojn da jaroj: tro malmulte laŭ la evoluteorio.


Por determini la konstanton H la astronomoj poste komparis la brilon de proksimaj astroj kun tiu de malproksimaj, kiujn ili supozas esti similaj. Ekde tiu komparo la valoro de H estas determinita. Sed ĝia valoro multe variis tra la tempo. En la 90-aj jaroj de la antaŭa jarcento la taksoj de la valoro de H variigis la aĝon de la universo de 6 al 25 miliardoj da jaroj! Nun la sciencistoj diras, ke ili sukcesis fiksi la valoron de H, nome je 70 km/s.Mpc^1 kun necerteco de nur 10%. Tiel ekzemple ili kalkulis, ke la distanco de la kvasaro SDSS J1044-0125 (kerno de iu galaksio) estas 14 miliardoj de lumjaroj²! Sed la valoroj R kaj H estas nur hipotezaj sen ia scienca bazo. La necerteco pri tiu rezulto estas do centprocenta kaj ĝia matematika kredindeco nula.

La datumo R estas determinata per la spektra delokiĝo de la astrolumo. Oni supozas, ke la forŝoviĝo al ruĝo estas proporcia al la rapideco de la malproksimiĝo de observata astro. Tamen ne estas pruvite, ke NUR la malproksimiĝo de astro kaŭzas tiun ŝoviĝon. Se aliaj kaŭzoj povas agi sur la luma ondolongo, ne necesas, ke la lumfonto moviĝas. Ni scias, ke la universo estas plena je gasoj, polvaroj, plasmaj kaj altpotenca energio. Dum sia vojaĝo al ni la lumo estas do submetata al multaj influoj. En nigra truoj la gravito povas tiel forte influu la lumon, ke ĝi ne sukcesas eliri el la truoj. Estas klare, ke la lumo de astro, preterirante grandan stelon, estas influata de ĝia gravito.

La renoma astronomo Halton Arp kontestas la rilaton inter ŝoviĝo al ruĝo kaj la efekto Doppler. Arp publikigis plurajn kliŝojn de galaksioj kaj kvasaroj kiuj tute konfirmas sian hipotezon. Tamen la astronomoj ne inkludas akcepti liajn rezultatojn kaj eĉ rifuzas ekzameni ilin. La kaŭzo estas simpla: la leĝo de Hubble fariĝis centra dogmo en astronomio. Se tiu dogmo estus forlasita, multaj verkoj kaj miloj da artikoloj de la pasintaj 80 jaroj fariĝus senvaloraj.

Jen unu el la plej famaj observoj de Arp. Ĝi koncernas foton de galaksio kaj kvasaro kiuj estas videble kunligitaj. Tio prave supozigas, ke ili troviĝas je la sama distanco. Por astroj kiuj troviĝas je la sama distanco la leĝo de Hubble antaŭdiras identan spektran ŝoviĝon. Nu, se oni interpretas R laŭ la efekto Doppler,

la galaksio havas rapidecon de 1800 km/s (distanco 84 milionoj da lumjaroj), dum la kvasaro havas rapidecon de 21.000 km/s (distanco: 978 milionoj da lumjaroj). La kvasaro estus do 12-foje pli malproksima de ni ol la galaksio, nome 900 milionoj da lumjaroj, kio ne eblas, ĉar oni ĉiam vidas ilin kunligitaj.



Kliŝo de galaksio ligita kun kvasaro.

Konkludo: la leĝo de Hubble estas falsa, ĉar ĝi baziĝas sur rilato kiu ne estis kontrolita, sed nur proponita al la sciencista mondo, kiu tuj akceptis ĝin. Or la progreso de la scienco konfirmas, ke tiu rilato estas nevalida.

Ĉu la lumo de astro povas perdi energion pro alia fenomeno ol la efekto Doppler? Jes. Per la efekto Compton. En 1927 Arthur Holly Compton ricevis la premion Nobel pro tiu malkovro. Energiperdo ankaŭ konstatablas, kiam fotono kolizias kun elektrono. Tiel lumo povas vidi sian ondolongon ŝanĝita, sen ke sia lumfonto moviĝas. Tio fenomeno eksplikas ankaŭ, kial la lumo de nia suno ŝoviĝas al ruĝo, kvankam ĝi ne malproksimiĝas de ni! La fontonoj elmetataj de nia suno devas trairi gastavolon sur la sunsurfaco kaj kolizias kun liberaj elektronoj. Parto de la energio de la fotonoj estas transdonata al la elektronoj (efekto Compton). Plie, la lumo elmetata sur la tangenta linio suno-tero prezentas pli fortan ŝoviĝon al ruĝo. Tio estas tute konforma al la efekto Compton, ĉar la lumo elmetata de la tangento devas trairi pli grandan distancon sur la sunsurfaco, kie la liberaj elektronoj estas pli grandnombraj.

La efekto Compton ebligas ankaŭ kompreni, kial la spektroŝoviĝo de la lumo povas esti diversa por la du steloj de t.n. binara stelo.

¹ 1 Mpc = 3,26 milionoj da lumjaroj. La konstanto H implicas, ke por ĉiu Mpc kiu separas nin de iu astro, la rapideco de tiu astro kreskas per 74 km/s .

² Unu lumjaro egalas $9.460.800.000.000 \text{ km}$!

La ‘malvarma’ stelo prezentas pli grandan ŝoviĝon ol la ‘varma’. Ĉar ambaŭ steloj orbitas unu ĉirkaŭ la alia, oni devus supozi, ke ilia ŝoviĝo estas identa (sama distanco, sama rapi-deco), se oni baziĝus sur la efeko Doppler.

Konklude, estas klare, ke ankaŭ la aĝo de la universo restas nekonata.

(*La revuo ‘Science et Foi*)

Nia rakonto: La domo de Eŭlalia (3) (*Ons verhaal: Het huis van Eulalie*(3))

Ni fariĝis bonaj amikoj, la geedzoj Leroux kaj mi, dum la tri monatoj, kiujn mi pasigis kiel ilia luanto. Efektive sinjorino Leroux prizorgis min kun diligenteco, kiu estis kvazaŭ patrina. Ambaŭ, kiel diris la maljunulo, super ĉio ŝatis paroli pri sia filino, kaj mi esperas, ke mi neniam estis malpreta aŭskulti ilin. Ilia pasio, ilia malgojo, ilia daŭra pensado pri ilia mortinta filino trafis min kiel belega kaj korduŝa. Kaj io kvazaŭ pala spirito de la knabino, plaĉa kaj dolĉa, ŝajnis ĉiam ĉeesti en la domo, la domo, kiun amo konstruis por ŝi, ne suspektante, ke la morto venos, tuj kiam ĝi estis finita, forpreni ŝin.

“Ho, ni multe ĝojas, Sinjoro, ke vi lasis al ni ŝian ĉambbron,” la maljuna paro neniam estis laca ripeti. Iun tagon la sinjorino kunirigis min al la ĉambro kaj montris al mi la belajn robojn de Eŭlalia, ŝiajn juvelojn, ŝiajn librojn, la bele binditajn librojn kiujn ŝi gajnis kiel premiojn en la monaĥinejo. Alian tagon ŝi montris al mi kelkajn el ŝiaj leteroj, demandante min, ĉu ŝi ne havas belan skribmanieron, ĉu la leteroj ne estis bele esprimitaj. Ŝi montris al mi fotojn de la knabino faritajn je diversaj aĝoj, harbuklon, ŝiajn vestaĵojn de bebo, la ateston de la pastro pri ŝia unua komunio, la ateston de la episkopo pri ŝia konfirmacio. Kaj ŝi montris al mi leterojn de la bonaj fratulinoj de la monaĥinejo Sankta Koro en Ruano, menciatajn la bonajn progresojn de Eŭlalia en siaj studoj, laŭdante ŝian konduton kaj karakteron.

“Ho, kaj pensi nun, ke ŝi forpasis, ke ŝi forlasis nin por ĉiam!” la maljunulino lamentis kun speco de senhelpa nekomprenemo, nekredemo kaj senespereco. Tiam, post momento, ŝi murmuris rezignacie, krucosignante sin: “La bona Dio scias ja, kion Li faras”.

Je la 12-a de aŭgusto, la datreveno de ŝia morto, mi iris kun ili al la paroĥa preĝejo, kie meso estis dirita por la ripozo de ŝia animo. Post la meso la maljuna paroĥopastro venis al ili kaj premis iliajn manojn, dirante al ili kelkajn konsolajn vortojn.

La 1-an de septembro mi forlasis ilin, rirante al Diepo. Iun posttagmezon mi renkontis tie sur la ĉefa strato tiun saman maljunan pastron. Ni haltis kaj interparolis – kompreneble pri la geedzoj Leroux, dirante kiel bonegaj homoj ili estas kaj kiel ili funebris pro sia filino. “Ilia amo estis pli ol amo. Ili adoris sian infanon, ili idoligis ŝin.

“Mi neniam estis atestanto de tia afekcio,” diris al mi la pastro. “Kiam ŝi mortis, mi serioze timis, ke ili perdos sian prudenton. Ili estis konsternitaj, ili ne plu estis si mem. Dum tre longa tempo ili kvazaŭ frenezis. Sed Dio estas kompatema: ili lernis vivi kun sia malĝojo.”

“Estas belege,” mi diris, “kiel ili vivtenas la memoron pri ŝi, kiel ili sanktigas ĝin. Kompreneble vi scias, ke ili konservas netuŝita ŝian ĉambbron kun ŝiaj aferoj en ĝi, tute kiel ŝi forlasis ĝin. Tio ŝajnas al mi belega.”

“Ĉu ŝian ĉambbron?” demandis la pastro, ne komprenante. “Kian ĉambbron?”

“Ho, ĉu vi ne scias?” mi demandis, mirigite. “Ŝia dormoĉambro en la ĉaleto. Ili konservis ĝin tia, kia ŝi forlasis ĝin, kun ĉiuj ŝiaj aferoj en ĝi, ŝiaj vestaĵoj, ŝiaj libroj...”

“Mi timas, ke mi ne povas sekvi vin,” diris la pastro. “Ŝi neniam havis dormoĉambbron en la ĉaleto.”

“Ho, pardonu min, Sinjoro Pastro. Unu el la antaŭflankaj ĉambroj estis ŝia dormoĉambro,” mi informis lin.

Sed li skuis la kapon.

“Vi eraras, Sinjoro. Ŝi neniam loĝis en la ĉaleto. Ŝi mortis en la malnova domo. La ĉaleto estis nur finkonstruita, post kiam ŝi mortis. La laboristoj apenaŭ forlasis ĝin.”

“Ne,” mi replikis, “estas vi kiu eraras. Vi certe forgesis tion. Mi estas certa. La geedzoj Leroux plurfoje parolis pri tio al mi.”

“Sed, kara Sinjoro,” la pastro insistis, “mi ne nur estas certa, mi scias tion. Mi sanktoleis la knabinon dum ŝia agonio. Ŝi mortis en la kampuldomo. Ili ne transloĝiĝis al la ĉaleto, kiu estis meblata en tiu momento. La lastaj mebloj estis metitaj en ĝin la tagon antaŭ ŝia morto. Neniu iam loĝis en la ĉaleto antaŭ vi. Vi estas la sola persono kiu iam loĝis en ĝi. Mi certigas vin, ke tio estas vera.”

“Nu,” mi konkludis, “tio estas vere stranga.” Kaj dum minuto mi estis konfuzita. Mi ne sciis, kion pensi pri tio. Sed nur dum minuto. Subite mi ekkriis: “Ho jes, mi komprenas, mi komprenas.”

Nun mi komprenis. Subite mi vidis la pian, belan trompon, kiun tiuj konsternitaj homoj

inventis por si mem, la belan, stultan iluzion kiun ili kreis por mildigi sian doloron. Ili konstruis la domon por sia filino, kaj ŝi mortis ĝuste kiam la domo estis preta. Sed ili ne povis toleri la penson, ke ŝi ne loĝis en ĝi dum unu mallonga semajno, eĉ ne dum unu sola tago. Tiu estis la lasta monero de ilia malĝojo kiun ili ne povis pagi. Ili ne volis rekonii la veron en siaj sortbatitaj koroj. Tial pie, respektive, kvazaŭ kun fermitaj okuloj, tiel ke ili ne vidis, kion ili faras, ili estis portintaj la aferojn de mortinta knabino en la ĉambron, kiun ili destinis al ŝi, ili dismetis ilin tie, dirante: “Tiu ĉi estas ŝia ĉambro; tio *estis* ŝia ĉambro.” Ili ne volis koncedi al si mem, ili ne permesis al si mem pensi, ke ŝi neniam, eĉ ne dum unu sola nokto, dormis en ĝi, ĝuis ĝin. Ili rakontis pian mensogon al si mem. Estis pia ludo de mistifo, kiun ili, kvazaŭ infanoj, ludis kune. Kiel la pastro diris, Dio estas kompatema. Ili estis kapabligitaj konfuzi sian falsajon kun realeco kaj trovi konsolon en ĝi. Ili kapablis forgesi, ke ilia mistifo estis nur mistifo kaj preni ĝin por bela, konsolanta vero. La lasta monero de sia malĝojo, kiun ili ne povis pagis, ne estis postulita. Ili povis konservi ĝin, kaj ĝi fariĝis ilia trezoro, pli altvalora ol oro.

Falsaĵo aŭ veraĵo? Mi kredas, ke estas iluzioj, kiuj ne estas falsaĵoj, kiuj estas la kompatemaj ridetoj de la Vero por ni.

(Henry Harland, trad. P.J.D.)

Semajno de la Internacia Amikeco

Sabaton, la 25.02.2012

CC Romaanse Poort

Brusselsestraat 63 Loveno

Temo: Esperanto kaj Interreto

10h00 Jarĉunside FEL

12h00 Varma bufedo

13h30 Prelegoj, kvizo, vortludoj

2x Gvidata promenado tra Loveno

17h30 Bulkoj, agrabla kunestado

Antaŭmendu viajn manĝojn:

- Tagmeza varma bufedo: 12,50 €

- Grandaj bulkoj: 2,50 € aŭ 3 €

www.esperanto3000.be - 0486-39.28.02

AKTIVAĴOJ DE LA LIMBURGA ESPERANTO-ASOCIO

En novembro kaj decembro 2011:

Ĵaŭdon, la 24.11.2011:

Jan Doumen prelegis pri la usona interna milito, kiu daŭris de 1861 ĝis 1861 kaj dum kiu mortis 620.000 usonanoj.

Ĵaŭdon, la 15.12.2011:

Precize je la 152-a datreveno de la naskiĝo en Bjalistoko de D-ro L.L. Zamenhof kvin membroj de LEA trafis sin en la restoracio ‘De Boskar’, Markt 1, en Peer, or festeno, kiu okazis en la plejagrabla etoso.

En januaro kaj februaro 2012:

Ĵaŭdon, la 12.01.2012:

Mihaelo Bronstein, la konata rusa poeto, aŭtoro kaj trubaduro prelegos en Esperanto pri sia naŭjara restado en la fifama gulago de Korvuta. Li ilustras sian prelegon per lumbildoj kaj kantos proprajn kantojn, akompanante sin sur gitaro. Lia prelego estos tradukita en la nederlandan por la neesperantistoj, kiuj certe ĉeestos. La vespero estos organizita en kunlaboro kun la Cultuurraad (Kultura Konsilio) de Peer. Senpaga eniro por ĉiuj.

Loko: la Kleine Zaal (Malgranda Salono), kiu troviĝas maldekstre de la enirejo.

Ĵaŭdon, la 23.02.2012:

S-ro Bert Boon, prezidanto de Esperanto Tienen, prelegos pri la fama flandra aŭtoro Willem Elsschot kaj ties verkaro, speciale pri “Het Dwaallicht”, la novelo kiun S-ro Boon tradukis en Esperanton sub la titolo “Vaglummo”, kaj kiu estas havebla ĉe FEL.

*Karaj Membroj de LEA,
Per tiu ĉi alvoko, mi volas atentigi vin pri tio, ke estas tempo pagi vian ĉiujaran koti-zon al FEL, se vi ankoraŭ ne faris tion. Sen via mona subteno nia organizaĵo ne povas ekzisti. Tiu kotizo sumas je 25,00 €. Se vi volas membriĝi nur ĉe LEA, via kotizo estas 12,50 €. La bankkonto de LEA ĉe KBC estas 735-0190144-12.*

